



# NEDERLANDA ESPERANTISTO

MAANDBLAD VAN DE NEDERL. ESPERANTISTEN-VERENIGING  
„LA ESTONTO ESTAS NIA”

Onder redactie van het Hoofdbestuur

REDACTEUR:

F. Weeke

Ijsseldijk 20, Diepenveen

Voor leden

gratis.

ADMINISTRATEUR:

P. M. Mabesoone

Pythagorasstr.122,Amsterdam-O.

## 6-a Beneluksa Kongreso

DUM PENTEKOSTO 1959: 16-17-18 DE MAJO, HAARLEM.

En nia unua komuniko ni sciigis, ke la projektita konferenco kun la Belgoj ne povis okazi. Intertempe ĝi okazis kaj la rezultatoj estas tre kontentigaj. Niaj Belgaj gesamideanoj aprobis la provizoran programon kaj la enhavon de la aliĝilo.

Novaj geanoj L.K.K.:

por la Reĝa Belga Ligo: s-ro H. Sielens, Antwerpen;

por la Flandra Esp. Ligo: f-ino J. Terrijn, Gent.

La urbo Haarlem estas tiel konata, ke ne estas necese prezenti ĝin al vi. Kiu ne iam estis ĉi tie dum vizito al la florkampoj? Ankaŭ inter la eksterlandaj rondoj de esperantistoj Haarlem estas konata loko. La 39-a U.K. postlasis neforgeseblan impreson! Do pri la urbo ni ne ĝenos vin, aŭ ĉu interas vin, ke la distanco inter la ekstremaj partoj de Amsterdam kaj Haarlem estas nun 5 minuta veturado per vagonaro kaj ke la ĵoĝantoj de la novaj „flats” en Haarlem-Noord povas vidi la ŝipojn en la Noordzee-kanaal? Ni supozas, ke tio ne tiklos vian scivolon por iri al Haarlem por konstati tion.

Pli interesa por vi estas la jeno:

Estas ĉiam L.E.E.N.-anoj, kiuj ne ŝatas sidi tutan tagon en salono kaj do ne ĉeestas la jarkunvenon. Tio estas tre bedaŭrinda, ĉar tio montras indiferentecon pri la laboro de la estraro kaj la sekcioj. Ni esperas, ke en Haarlem multe da gemembroj vizitos la jarkunvenon. Ni tamen ne povos devigi ilin, sed nur esperi, ke

ili sin montros fidelaj geanoj de L.E.E.N.

Kiel decas al bona gastiganto, ni tamen pripensis la aferon kiel agrablighi la restadon al tiuj, kiuj ne vizitos la kunvenon. Ni ĉefe pensis pri la edzinoj kaj fianĉinoj de niaj delegitoj.

Por ke ankaŭ ili pasigu agrablajn horojn en nia urbo, ni projektis malgrandajn ekskursojn tra la urbo kaj ĉirkaŭaĵoj.

Ni poste informos vin pri tiu programo.

Haarlem atendas vin!

Venu grandnombre. Ne forgesu, ke niaj kongresoj estas pli malpli anstataŭaĵo de la U.K. Ne ĉiuj povos viziti U.K., sed vizito al la Beneluksa Kongreso estas ebla por multe de geanoj de la tri asocioj, kiuj aranĝas ĝin. Ni klopodos veki la interesigon ankaŭ de aliaj geesperantistoj, ni pensas pri Francujo, Germanujo, Anglujo, Danujo, Svedujo. Kompreneble ni ne atendas multajn. Tiuj, kiuj venos estos tutkore bonvenaj! Eble vi povos kaj bonvolos instigi eksterlandan korespondant(in)on.

L. K. K.

### Gratulkartoj

por Kristnasko kaj Novjaro

La Libro-Servo vendos la restintajn kartojn favorpreze po f 0.25 por serio de 6 ekz.

## 44-a Universala Kongreso de Esperanto

Varsovio — 1-8 aŭgusto 1959 —  
Pollando

### Jubilea Zamenhofa Jaro

Sub honora protektado de la Ministro-  
Prezidanto de la Pola Popola Respu-  
bliko

#### JOZEF CYRANKIEWICZ

ADRESO: 44-a Universala Kongreso  
de Esperanto, Varsovio.

TELEGRAMOJ: Esperanto-Kongreso,  
Warszawa.

BANKO: Narodowy Bank Polski,  
Warszawa, VII O.M. nr. 1531-9-525.

#### OFICIALA KOMUNIKO

Novembro 1958.

#### GLUMARKOJ:

La kvarkolora glumarko de la Uni-  
versala Kongreso kun la arta kongresa  
emblemo estas aĉetebla ĉe la landaj  
asocioj, ĉe U.E.A. aŭ ĉe la Kongresa  
Oficejo je prezo de 0,25 us. dolaroj por  
folio de 25 pecoj.

#### KONGRESA KARTO:

Ĉiu kongresano ricevos fine de decem-  
bro la kongresan karton.

#### DUA BULTENO:

La Dua Bulteno, kiu enhavas detalajn  
informojn pri ekskursoj kaj loĝado,  
aperos en februaro kaj estos sendata  
al ĉiu aliĝinto.

#### HOTELAJ PREZOJ:

La nacia turisma entrepreno ORBIS  
disponigas al la kongresanoj jenajn  
pensionojn en hoteloj:

Kat. A (luksa) po 10 us. dolaroj por  
persono kaj por tago.

Kat. B po 7,50 us. dolaroj por persono  
kaj por tago.

Kat. C po 5,50 us. dolaroj por persono  
kaj por tago.

Universitata domo: ĉ. 20 us. dolaroj  
por la tuta semajno.

La prezoj inkluzivas loĝadon kaj tri  
kompletajn manĝojn. La manĝoj povas  
okazi en la Kongresejo.

#### AUTOMOBILISTOJ:

La kongresanoj, kiuj deziras veturi al  
la Universala Kongreso per propra  
veturilo estas petataj informi la Lokan  
Kongresan Komitaton, por plifaciligi  
la necesajn formalajn, plej malfrue  
unu monaton antaŭ sia forveturo.

#### KONGRESEJO:

Ĉiuj laboroj kaj programoj de la 44-a  
Universala Kongreso de Esperanto  
okazos en la 36-etaĝa Palaco de Kul-  
turo kaj Scienco, en la koro de Varso-  
vio. En ĝi baseno por bano, restoracioj  
kaj liberaera terasa kafejo sub sun-  
ŝirmiloj garantios al la kongresanoj  
agrablajn laborpaŭzojn.

#### NOVAJ KOTIZOJ:

Post la 31-a de decembro validos  
jenaj novaj kotizoj:  
Kongresano 7,— us. dolaroj aŭ egal-  
valoro.

Edz(in)o 3,50 us. dolaroj aŭ egalvaloro.  
Junul(in)o ne pli ol 20-jara kaj stu-  
dentoj 2,50 us. dolaroj aŭ egalvaloro.  
Individua Membro de U.E.A. ricevas  
rabaton de 1 us. dolaro: edzino je  
0,50 us. dolaro.

#### (1) EKSKURSO:

Unu el la kongresaj ekskursoj vizitos  
Byalistok, naskiĝurbon de d-ro Za-  
menhof, okaze de la enmasonigo de  
la fundamenta ŝtono por la konstru-  
ota monumento honore al la aŭtoro  
de Esperanto.

#### (1) STATISTIKO

(ĝis fino de oktobro):

Argentino 1, Aŭstralio 1, Aŭstrujo 6,  
Belujo 9, Bulgarujo 3, Brazilo 3,  
Britujo 24, Danlando 15, Etiopio 1,  
Finnlando 3, Francujo 40, Germanujo  
40, Hispanujo 5, Islando 2, Italujo 26,  
Japanujo 1, Jugoslavio 24, Maroko 1,  
Meksikio 1, Monako 5, Nederlando 4,  
Norvegujo 3, Novzelando 1, Pollando  
72, Svedujo 10, Svisujo 7, Urugvajo 1,  
Usono 3. Entute 312 el 28 landoj.  
(Pasintjare 212 el 25 landoj).

G. C. Fighiera,

Konstanta Kongresa Sekretario.

P.S. La ĉefdelegito en Nederlando,  
s-ro J. Telling, Schietbaanlaan 106 A,  
Rotterdam-C. (tel. 0 1800-50871; poŝt-  
ĉek-konto 242619) informis nin, ke la  
kotizoj por Nederlandaj estas ĝis la  
31-a de dec. 1958-a por kongresan(in)o  
24.— gld.; edzino de kongresano 12.50  
gld.; junul(in)o ne pli aĝa al 20-jara  
kaj student(in)o 8.— gld. Gekongre-  
sanoj, kiuj estas individuaj membroj  
de U.E.A. ricevas rabaton de 3.— gld.  
kaj la edzino de kongresano - indivi-  
dua membro 1.— gld. je la nomitaj  
kotizoj. Ĉiujn kotizojn oni pagu nur  
en la poŝtĉekkonton de la ĉefdelegito.  
Cetere ĉiuj informoj pri la kostoj kaj  
aliĝiloj estas ĉe li haveblaj.

## KOMUNIKOJ DE LA LIBRO-SERVO

Pythagorasstraat 122, Amsterdam-O.

Nun estas la ĝusta tempo por instrui esperanton al aliaj aŭ por mem  
pli funde studi la lingvon. Helpiloj por vi estas:

Methodisch Leerboek (Dirksen)	f	1.50
Esperanto in 20 lessen (Bakker)	f	3.50
Esperanto Leerboek (Zondervan/Manders)	-	2.50
bijbehorend oefenboekje	-	1.—
Esperanto por infanoj (Solemon)	-	1.50
Sub la verda standardo (Korte), gvidilo	-	2.50
laboriloj I kaj II	po	1.—
memorigilo	-	0.65
Honderd vragen over grammatica en onderwijs	-	0.75
Leidraad Literatuur (Degenkamp)	-	0.75
Tre la labirinto de la gramatiko (Faulhaber)	-	9.75
Esperanto leren lezen (Makkink)	-	1.—
Vortoj kaj esprimoj (Zondervan)	-	1.15
Gvidilo tra la Esp.-movado (De Bruin)	-	1.95
Meulenhoff-vortaro, ned./esp.—esp./ned.	-	4.25
Esp. in een notedop (zakwoordenboekje)	-	0.55
Plena Vortaro (tute en esperanto)	-	11.50
ĝin devas posedi ĉiu esperantisto	-	1.25
Examen doen	-	1.25

Ĉu por viaj infanoj vi jam aĉetis la ĉarman libreton

Sankta Nikolao en Nederlando	-	1.50
kun kantoj kaj bildoj		

La ĝajiga festo de la 5-a de decembro tre taŭgas por donaci libron.  
Por bona elekto petu nian libroliston.

#### SKIFERIO

#### DE LA

#### ESPERANTO-JUNULARO DE SVISLANDO

#### ADELBODEN

26-a de decembro 1958 ĝis la 4-a de  
januaro 1959.

1400 metrojn alta skistacio en la  
svisaj Alpoj.

Ĉar la skirestadoj de la pasintaj  
jaroj bonege sukcesis, ni decidis  
komenci ĉi tiun jaron. Jen kiel ni  
vivos:

Modesta ĉaledo (alpa lignodomo)  
atendos nin. Junuloj dormos sur paj-  
lomatracoj, junulinoj ricevos litojn.  
Lerta kuirstino-instruistino pretigos  
niajn manĝaĵojn; sed ĉiuj kunhelpos  
en la interna doma laboro.

Aĝo: de 16 jaroj ĝis 30 jaroj.

Prezo: 90 svisaj frankoj. Ĉio estas  
enkalkulita: loĝado, manĝaĵoj, ase-  
kuro kontraŭ akcidentoj, 2 skieks-  
kursoj, skikurso por komencantoj, Es-  
peranto-kursoj por komencantoj kaj  
progresintoj.

Aliĝo: Partoprenontoj, bonvolu kiel  
eble plej baldaŭ anonci letere vian  
partoprenon kun viaj nomo, antaŭ-  
nomo, preciza adreso, naskiĝdato,  
pasportnumero (tiuj lastaj indikoj es-  
tas necesaj por la asekuo). Sciigu  
ankaŭ, ĉu vi estas skilernanto aŭ pro-  
gresinto. Se vi deziras lupreni skiojn,  
menciu vian grandecon!

Samtempe kun la aliĝilo sendu la  
antaŭpagon de sv. fr. 25.— (poŝt-  
ĝirkonto: IV 6151, Gacond, La Sagne/  
NE, Svislando).

Aliĝo sen antaŭpago ne validas. La  
antaŭpago ne estas repagebla, eĉ se  
la aliĝinto ne venos.

Informoj: Petante pliajn informojn,  
bonvolu kunsendi internacian respon-  
d-kuponon.

Atentu: Ĉar la nombro de la parto-  
prenantoj estas limigita kaj nia domo  
ne elasta, tuj aliĝu kaj ne hezitu ĝis  
kiam ĉiuj lokoj estos okupitaj. Ne  
estos eble partopreni nur parton de la  
skirestado.

Aliĝadreso: Andrée Gacond, Crêt  
78, La Sagne/NE, Svislando.



La bildo montras parton de la ekspozicio pri infandeseĝnaĵoj kaj esperantaĵoj, kiun la sekcio en Deventer aranĝis en septembro.

## Komunikoj de la Ĉefestraro.

**La gazetar-servo.** La gvidanto de tiu servo sciigis al ni, ke li deziras demeti sian funkcion ek de la 1-a de januaro 1959 pro tro multe da laboro en siaj diversaj funkcioj. La ĉefestraro nun serĉos alian personon, kiu volas transpreni la taskon. Ĉi tie ni jam nun kore dankas s-ron Ponti pro la farita laboro en la servo de L.E.E.N.

**Pli da kontakto.** Ĉar la adm. estraro opinas, ke malgraŭ diversaj klopodoj faritaj, tamen la kontakto inter la sekcioj kaj la ĉefestraro ne estas kontentiga, ĝi ellaboris planon por plibonigi ĝin. Ni povas nun sciigi al niaj sekciaj estraroj, ke la intenco estas okazigi en la daŭro de la venontaj monatoj kelkajn kunvenojn de membroj de la adm. estraro kun sekciaj geestraranoj, gedistriktestroj kaj ĝeneralaj gemembroj en diversaj lokoj de nia lando. La unua el tiaj kunvenoj estas fiksita je dimanĉo, la 14-a de decembro, en Deventer kaj okazos je la 13-a kaj duono en hotelo DUYM, Keizerstrato, proksimume 7 minutojn de la stacidomo. Al tiu kunveno estas invitataj delegitoj el *Almelo, Arnhem, Deventer kaj Enschede* kaj la ĝeneralaj membroj en tiu distrikto, kies estro estas s-ro

C. B. Zondervan. Samspecaj kunvenoj estas projektitaj en *Hilversum*, la 11-an de januaro 1959; en *Rotterdam*, la 15-an de februaro; en *Groningen*, la 22-an de marto kaj en *Alkmaar*, la 19-an de aprilo, ĉiuj je dimanĉo. Ni petas, ke oni jam nun notu tiujn datojn.

Por ke la kostoj por la ĝenerala kaso ne fariĝu tro altaj, la ĉefestraro ne repagos la vojaĝkostojn al la delegitoj kaj ĉar ĝi elektis la kunvenlokojn tiel, ke la distancoj ne estos tre longaj, ĝi estas konvinkita pri tio, ke la gevizitantoj mem volos pagi tiujn kostojn.

## La 10-a de decembro 1958-a

estas la deka datreveno de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj. Ni esperas, ke niaj sekcioj agos laŭ la cirkulero, kiun ili jam ricevis pri ĉi tiu okazaĵo, ĉar nia esperanto-movado ja fakte agnoskas la samajn rajtojn, ĉar ĝi estas esprimo de la ideo pri rasa, nacia, religia kaj lingva egaleco. Tial ĝi povas prosperi nur sub kondiĉoj de plena kaj efektiva respekto al esencaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj de la homo. (Vidu la

## Interesa Eksperimento kronita de plena sukceso.

(daŭrigo de p. 77)

Al mi ĝi donis la impreson de granda kermeso kaj la pli granda parto de la gevizitantoj estas ne-vienanoj. Ni balanciĝis supren en la giganta rado por ĝue sperti la rigardon sur lumigitan metropolon je alteco de sesdek kvar metroj. La populareco de tiu rado eĉ grandiĝis post la apero de la angla filmo „La tria viro”.

La morgaŭan tagon ni pasigis, vizitante la vidindaĵojn de la aŭstra ĉefurbo. Matene ni interne rigardis la antaŭe imperiestran palacon Schönbrunn kun ĝiaj 1400 ĉambroj kaj sa-

libron: „Aktualaj problemoj de la nuntempa internacia vivo” de d-ro La (na).

Ankaŭ la Ĉarto de la Unuigintaj Nacioj en pluraj artikoloj parolas pri la homaj rajtoj, sed kvankam kompreneble ĉiuj ŝtatoj aliĝintaj al U.N. subskribis la Ĉarton kaj do formale devigis sin ĉiam agi konforme al ĝi, ni scias tamen, ke en la praktiko montriĝas multaj malfacilaĵoj rilate al la aplikado kaj interpretado de la Ĉarto. Ĉi tio certe validas ankaŭ por la Deklaracio de la Homaj Rajtoj. Unu el la plej gravaj malfacilaĵoj estas, ke la ŝtatoj-membroj de U.N. ne rezignis pri la plej malgranda parto de sia suvereneco. Pro tio U.N. ne disponas pri la povo efike interveni, kiam iu ŝtato ne aplikas la postulojn de la Ĉarto en ia konflikto, ĉar tiam oni tuj proklamas ĝin „interneta afero” kaj U.N. ne rajtas miksi sin en la internajn aferojn de kiu ajn ŝtato-membro.

Tiu fakto estas ŝanĝebla nur, se la publika opinio pli kaj pli okupas pri la laboroj de U.N. Tial estas ĉi tiu necese, ĉiufoje kiam estiĝas eblo por atentigi la homojn pri gravaj faktoj en la historio de U.N., ke tiuj faktoj kiel eble plej grandskale estu publikigataj kaj disvastigataj, por ke ne nur la nuna, sed ankaŭ la venonta generacio pli kaj pli konsciigu pri la forto, pri kiu ili disponas, ĉiam denove instigante sian propran registraron sincere apliki kaj agnoski la regulojn de U.N. kaj ĝiaj aliaj organoj. Se oni volas scii iom pri ĉio, kio koncernas la laboron de U.N., oni turnu sin al la Nederlanda Informa Servo por la Unuigintaj Nacioj, Javastr. 30, Hago.

lonegoj, parte riĉe ornamitaj kaj vere paradaj juveloj. Tiu ĉi pompa konstruaĵo sin montras en la stiloj baroka kaj rokoka per volutoj kaj aliaj delikataj ornamaĵoj kaj iam estis la preferata somerrestadejo de Maria Theresia, Napoleono kaj imperiestro Franz Joseph. En la jaro 1832 mortis en la sama loko la filo de Napoleono, la duko de Reichstadt, nur 21 jarojn aĝa. Vieno posedas multajn vidindaĵojn, sed ne estas mia intenco priskribi ilin detale, ĉar tiam ĉi tiu raporto tro longiĝus. Ni admiris la universitaton, la urbdomon, sur kies 65 metrojn alta turo ni ĝuis belan panoramon. la Sanktan Stefanon, ekkonilon de la metropolo, la parlamenton, la operon kaj, neforgesinde, la esperanto-muzeon.

La alian tagon ni povis pasigi, ĉu butikumante, ĉu nenion farante. Je la dekdua ni daŭrigis la vojaĝon tra Baden al Rust ĉe la lago Neusiedler. Tiu grandega lago (330 km<sup>2</sup>), kiu situas en la hungara ebenaĵo, antaŭ multaj jaroj estis tute senakva, poste ĝi denove pleniĝis per akvo kaj nun ree forvaporigas la akvo el ĝi. La lago estas tre malprofunda. Dum la drameca ribelo de la Hungaroj multaj rifuĝintoj serĉis sian vojon tra tiu lago. Floras ĉi tie multaj vitejoj, vera paradizo por la ŝatantoj de bonkvalitaj vinoj. La pejzaĝo estas ornamita per alte kreskantaj kankampoj, kies produktojn oni eksportas grandkvante al multaj landoj. Paradizo por cikonioj kaj ardeoj, kiuj konstruas siajn nestojn ĉi tie en nenombrela kvanto. Preskaŭ sur ĉiuj domaj tegmentoj oni povas vidi tiujn longkrurulojn. Fiŝkaptistoj, ĉasistoj kaj akvosportuloj povas agrable pasigi la ferion ĉi tie.

Vizitinda estas la maŭzoleo de la fama komponisto Joseph Haydn, vera labirinto de grotoj kaj kavernoj, en kiu staras grupoj el ligno tranĉitaj statuoj, prezentantaj grandparte figurojn el la biblio. Oni trovas tie la malnovan orgenon, sur kiu la majstro ludis siajn mondfamajn melodiojn.

Ni nun veturis en la direkto de Wiener Neustadt, kie ni admiris la antaŭ kelkaj tagoj inaŭguritan Esperanto-parkon kaj daŭrigis trans la Semmering-pasejo al Bruck laŭlonge de la Mur-valo al Fohnsdorf. La Semmering-pasejo, jam de longe tre grava

(daŭrigo s.p. 88)



# BIBLIOGRAFIO.

## UNITARISMO - REALIGITA HOMARANISMO

(kompilis kaj tradukis el la angla lingvo Rüdiger Eichholz. Eldonis: Esperanto Press, Oakville, Ontario, Kanado. Prezo 0,75 dol. aŭ egalvaloro. Havebla ĉe nia Libro-Servo.)

La verkinto de ĉi tiu libreto 60-paĝa, formato 20,5 x 16 cm., diras en la antaŭparolo, ke la homaranismo de Zamenhof kaj la moderna unitarismo estas multrilate parencaj, citante por tion pruvu parton de paĝo 118-a el la libro „Vivo de Zamenhof” de prof. Privat. La unitarismo estas religia kredo en Usono kaj Kanado, kiu estas ankaŭ iom parenca al la liberalpensata eklezio ĉe ni, sed la unitarismoj ne kredas je persona Dio kaj ne agnoskas la dogmojn pri Triunueco, peko,

la perdita paradizo k.t.p. La enhavo de la libreto fakte konsistas el du partoj. En la unua parto ni aŭdas ion pri la estiĝo de la unitarismo kaj pri la kredaro de la nuntempaj unitarismoj; kiel ili diservas k.t.p. En la dua parto troviĝas paroladoj, kiujn faris kelkaj eminentaj unitarismoj. Ĉi tiuj paroladoj pritraktas tre aktualaĵojn problemojn kaj multe diferencas de tio, kion ni ofte aŭdas en la predikoj de niaj predikistoj. Ni tre ĝojus, se multaj prenos ĉi tiun libreton en la manojn por legi kaj pripensi ĝin. La lingvaĵo estas simpla, flua kaj klara. Ni povas forte rekomendi ĝin ankaŭ pro tio, ĉar ĝi estas la unua esperantlingva libreto, kiu informas nin pri la unitarismo.

## ALKO KAJ SUNA EN SIAJ DU DOMETOJ

(verkis Verna Hills; el la angla lingvo tradukis Rüdiger Eichholz kaj eldonis Esperanto Press, Oakville, Ontario Kanado. Prezo: 0,95 dol. aŭ 3,80 gld. Havebla ĉe nia Libro-Servo.)

Ĉi tiu libreto 78-paĝa kun multaj ilustraĵoj de Stanley Cooper estas speciale verkita por junaj infanoj 3- aŭ 4-jaraj. La enhavo konsistas el diversaj rakontoj pri ĉiutagaj travivaĵoj de la du infanoj, Alko kaj Suna, kiuj loĝas en du najbaraj tute egalaj dometoj. Krome ĝi enhavas antaŭparolon de la tradukinto kaj „Vorto al gepatroj kaj instruistoj” de Sophia L. Fahs, en kiu ŝi klarigas la celon de la verketo. Tiu celo estas ne nur doni al la infanoj legomaterialon, sed ankaŭ pere de la enhavo servi al la religia eduko de la infanoj. Religia eduko komprenita en tre larĝa senco kaj ne kiel konatiĝo kun jam fiksitaj dogmaroj. Por tiaj junaj infanoj multaj ĉiutagaj aferoj ja estas surprizoj kaj mirigaĵoj kaj ĉu el miro ne estiĝis la filozofio? Tial la tradukinto esperas, ke multaj gepatroj esperantistaj uzos ĉi tiun libreton por doni al siaj infanoj taŭgan materialon por la spirita evoluo. La lingvaĵo estas klara kaj simpla; ni bedaŭras nur, ke la tradukinto kelkfoje uzis tiom - kiom anstataŭ tiel - kiel. Cetere forte rekomendita.

F. W.

# LA STUDANTO

Jen la kompletaj vortoj de

## Ekzerco 51 A:

### KONTENTIGA ELEKTO.

Patro takte (*adverbo!*) informis sian (*posedo de la subjekto; do: sian = de si*) kvarjaran filon pri la pligrandiĝo de la familio per nova frateto. La filo multe ĝojis kaj diris, ke li povos kaj volos ludi kun sia nova frateto. Pensinte (*bijwoordelijk deelwoord in plaats van de bijwoordelijke bijzin: Post kiam li pensis*) kelkajn sekundojn (*tijdsbepaling zonder voorzetsel sian filon (posedo de la subjekto!*) al la bebosalono de akuŝejo kaj montris al sia filo lian frateton (*ja la frato de la filo, ne de la patro; tial: lian!*). La knabo kompare (*geeft aan de wijze van kijken, dus bijwoord!*) rigardis ĉiujn bebojn en la granda salono (*na het voorzetsel en geen n, als er geen sprake is van een beweging naar een plaats toe; in dat laatste geval zou er een richtings-n volgen, maar dat is hier niet het geval!*).

„Feliĉe,” li trankvile (*beide woorden zeggen niet iets van een zelfstandigheid en zijn dus bijwoorden!*) diris, „panjo elektis la plej belan el ĉiuj!”

Jen la kompletaj vortoj de

## Ekzerco 50 B:

### MALKAŜITA SEKRETO.

Rigardante sian eksterordinare ampleksan onklinon (*posedo de la logika subjekto de la adverba participo; tial: onklinon!*), la genevoj (*se estas nur po unu de ambaŭ seksoj, jam estas du personoj, tial la pluralo!*) estis tre scivolaj pri ŝia pezo (*ne de la subjekto, do ne: sia!*). Unu el la nevoj taksis sian onklinon pli peza (*predikativo objekta = bepaling van gesteldheid bij het voorwerp; daarom géén n!*) ol 100 kilogramojn (*adjekto sen prepozicio, tial kun n; pli kaj ol estas adverboj!*). La aliaj supozis, ke ŝia pezo (*subjekto, do ne posedo de la subjekto; tial: ŝia!*) atingis (la nereкта parolo havu la saman formon kiel la rekta!) la 125 kilogramojn. Ĉiuj bridis sian scivolemon, ne kuraĝante peti sian onklinon (*posedo de la logika subjekto de la*

*infinitivo; tial: sian!*) sciigi sian pezon (*posedo de la logika subjekto de la infinitivo sciigi!*), ĉar ŝi montris sin facile ofendebla (*objekta predikativo; do sen n!*). Nevo havanta (= *kui havas*) aŭtomobilon pesitan antaŭ nelonge proponis al sia onklino veturi en lia aŭto (*LA LOGIKA SUBJEKTO DE LA INFINITIVO „VETURI” ESTAS: LA ONKLINO!*) al alia nevo. Ŝi kortuŝite (*kun a, se oni rigardas la vorton predikativo subjekta*) akceptis la proponon, ne konjektante la kaŝitan intencon. Survoje li pasis sian aŭtomobilpesejon, kie lia aŭto (*subjekto de la subpropozicio; tial: lia!*) estis pesata (= *werd gewogen; aŭ: pesita = was gewogen!*) antaŭ nelonge. Sincere dirinte, ke li bezonas informon de la pesisto, li veturigis sian aŭton sur la pesilponton (*direkta akuzativo!*). Li eliris, lasante sian onklinon en sia aŭto. La montrilo de la pesilo senindulge malkaŝis la sekreton de lia onklino (*la subjekto ja estas: la montrilo!*): 123 kilogramoj (*la vorto malantaŭ la duobla punkto staras tute aparte kaj ne bezonas la akuzativan formon por esti bone komprenata!*).

## NOVAJ EKZERCOJ

### Ekzerco 52 A:

(por gekomencantoj):

Traduku en Esperanton:

TIWJFEL AAN LEERPLICHT?

Johan was zes jaar en kon, neen, moest voor het eerst naar de lagere school. De wet op de leerplicht noopte hem daartoe, maar hij was zich daarvan niet bewust. Toen hij de eerste morgen op de schoolbank had doorgebracht, groette hij de onderwijzeres en zei geruststellend tot haar:

„Deze morgen is mij goed bevallen. Misschien kom ik vanmiddag of morgen wel weer....”

### Ekzerco 51 B:

(por geprogresintoj):

HET KIEVITSEI.

In Friesland is het zoeken van kievitseieren een zeer gewilde voorjaars-sport. Vele Friezen, oude zowel als jonge, trekken in het voorjaar met een polsstok over de schouder het vrije veld in en slaan het gedrag van de

## Trilanda Renkontiĝo

la 13-an kaj 14-an de decembro 1958-a.

Ora jubileo de la esperantista grupo en Verviers kaj festo de Zamenhof.

Niaj gesamideanoj en la limregiono de Belgujo, Germanujo kaj Nederlando invitas ĉiujn gesamideanojn partopreni la festaraĝojn. Loko de la renkontiĝo estas la Teknika Lernejo apud la stacidomo en Verviers. La programo estas alloga kaj mencias i.a. ankaŭ akcepton en la urbdomo. Sabaton, la 13-an de decembro, je la 17-a estos la malfermo. S-ro T. Demarche, rue des Hospices 59, Verviers, Belgujo, volonte donos ĉiujn informojn.

## El Niaj Sekcioj.

Sekcio Zaandam.

Sekr. P. L. Takstraat 64

Dimanĉon la dekkvaran de decembro ni multnombre vizitu la Zamenhof - rememorkunvenon, kiu ĉi-jare okazos nun en Krommenie. Ni iru ĉu vagonare ĉu bicikle. Pri detalajoj ni informos siatempe per aparta cirkulero. Nia „Boeken-Ketting”, pri kiu ĉiu membro estas informita ĝis nun kontentige marŝas. Por partopreno oni turnu sin al la iniciatinto nia membro J. K. Hammer Wibautstraat 33 al la kotizenkasigantoj.

## Ned. Esperantisten-Ver. „La Estonto Estas Nia”.

### DAGELIJKS BESTUUR:

F. Weeke, IJsseldijk 20, Diepenveen: voorzitter en vic-ĉefdelegito U.E.A.  
E. de Wolf, Joh. de Breukstraat 18, Haarlem: vice-voorz. en 2-e sekr.  
Telef. 0 2500-56133.

Mej. Th. E. S. v. d. Reijen, Rijksstraatweg 90, Haarlem: sekr.esse.  
Telef. 0 2500-57433.

B. J. J. Albers, Olympiaweg 69 III, Amsterdam (Z.): penningmeester.  
Postrek. 34563. Telef. 0 20-734601.

### MAGNETOFOON-DIENST:

Joh. de Breukstraat 18, Haarlem.

### BOEKENDIENST:

Mevr. S. Mabesoone-Visser, Pythagorasstraat 122, Amsterdam (O.).  
Postrek. 76915.

### BIBLIOTHEEK:

E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht.

### ALG. NED. ESP. EXAMENCOMMISSIE:

Mej. H. M. Mulder, Zilvermewstraat 29, Badhoevedorp: sekr.esse.

### FONDAJO-MABESOONE:

Mej. J. E. Prins, Hora Siccamasingel 294, Groningen: penn.esse.  
Postrek. 815889.

### ĈEFDELEGITO U.E.A.:

J. Telling, Schietbaanlaan 106 a, Rotterdam. Postrek. 242619.

### PROPAGANDA-DIENST:

J. Calado, Vergeet-mij-nietstraat 29 b, Rotterdam.

### PERSDIENST L.E.E.N.:

D. M. Ponti, Eendrachtsweg 7, Rotterdam (C.)

weidevogels, voornamelijk de kieviten, aandachtig gade. De kenner kan aan het gedrag van de vogels zien, of ze een ei hebben gelegd en, zo ja, waar. Wie het eerste kievitseï in de lente vindt, zendt het naar de koningin en krijgt dan een vorstelijke beloning.

Jansma had vaak gehoopt eens de eerste te zijn en die beloning in de wacht te slepen, maar een ander was hem steeds vóór geweest, tot hij dit voorjaar een kievitseï vond in het land van zijn buurman nog vóór de eerste maart. Opgetogen kwam hij thuis. Geestdriftig liet hij het ei zien, maar ineens viel het op de grond. Jansma keek eerst betouterd, toen verbaasd en daarna opgelucht: het ei bleek gekookt te zijn..... Zijn buurman had hem waarschijnlijk een poets gebakken.

*Ekzercojn korektotajn la gelegantoj sendu (kun afrankita koverto por la resendo!) al la kompiladanto de la rubriko: S. S. de Jong Dzn, Wallaweg 3, TJERKWERD (Fr.). Tel.: 0 5157-9146.*

(*daŭrigo de p. 85*)

ligilo inter Malsupra Aŭstrio kaj Stiro, vidigis al ni la unuan grandan eŭropan montfervojon, konstruitan en la periodo de 1848-a ĝis 1954-a, havantan longon de 55 km kaj trairantan 65 tunelojn kaj 16 viaduktojn, ĝis alteco de 897 m super la marnivelo. Eksterdube, giganta laboro en tiu tempo. Antaŭ nelonge okazis en tiu s. regiono kataklismo, kaŭzanta grandajn difektojn. Traveturante la riĉe naturdotitan landon, ni rimarkis homojn riparantaj la vojojn kaj de tempo al tempo ni devis vadi tra la akvo per la aŭtobuso. Survoje al Klagenfurt ni preterpasis la fieran kastelon Hochosterwitz, la plej grandan en sia speco en la tuta Aŭstrio, kiel agloneston sin kaŝantan en la altaj montoj, signon de potenco de la antaŭaj registoj. Laŭlonge de la 17 km longa Wörthersee ni admiris la ravan situon de ĉi tiu intermonta lago, kun bluverda akvospegulo. Ĝi estas preferata ripoz-

(*daŭrigota*)